
La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-06 n-ro 408

# Ni ĵus havas la unuan senperan pruvon ke supermasivaj nigraj truoj regas stelo-formadon



Bombatako mortigis almenaŭ 11 homojn en afgana ĉefurbo Kabulo

Israelo planas elpeladon de dekoj da miloj da migrantoj

KDPR konsentis okazigi altnivelan intertraktadon kun Sud-Koreio

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Israelo planas elpeladon de dekoj da miloj da migrantoj
*Preskaŭ 40 000 migrantoj p. 03*

KDPR konsentis okazigi altnivelan intertraktadon kun Sud-Koreio
*La 9-an de januaro en la "paca hejmo" p. 04*

Usono kaj Sud-Koreio ne okazigos militekzercon dum Vintraj Olimpikoj en *Pyeongchang*
*Sekureco kaj sukceso de la Vintraj Olimpikoj p. 04*

Bombatako mortigis almenaŭ 11 homojn en afgana ĉefurbo Kabulo
*Kaj 20 aliaj vunditaj p. 05*

Sudana armeo refoje longigis militpaŭzon je tri monatoj
*Krei pacan atmosferon por la intertraktadoj p. 05*

Ni ĵus havas la unuan senperan pruvon ke supermasivaj nigraj truoj regas stelo-formadon
*La potencaj ventoj emanigataj el supermasivaj nigraj truoj formas tutajn galaksiojn p. 06*

Dentisto estis kondamnita pagi milionon kompense al sia patrino
*Ŝi prizorgis lian vivtenon kaj diplomigis lin kiel dentiston p. 07*

Pupoj por bona celo
*Por la porinfana helpinstitucio Unicef p. 08*

La du plej famaj bengalaj poetoj
*Rabindranath Tagore kaj Kazi Nazrul Islam p. 09*

Ĉina fakultato instruas Esperanton al ĉiuj lernantoj
*Aviad-Turisma Fakultato de la Artkolegio de Kunming p. 11*

Hodiaŭe
*Ĝibran Ĥalil Ĝibran; kaj Francio p. 11*

# Israelo planas elpeladon de dekoj da miloj da migrantoj

Preskaŭ 40 000 migrantoj devos forlasi la landon, antaŭ la fino de marto 2018. Male, ili estos malliberigitaj.

Pasintan merkredon [03 jan 2018], Israelo anoncis lanĉon de programo, kiu devigas preskaŭ 40 000 kontraŭleĝajn enmigrintojn fari elekton, antaŭ la fino de marto 2018, ĉu forlasi la landon aŭ esti mallebirigitaj je sendifina daŭro.



Komence de la kunveno de sia kabineto, Ĉefministro Benjamin NETANJAHU esprimis sian ĝojon pri la aranĝo de tiu projekto.

**Aviadilbileto kaj 3 000 eŭroj**

Laŭ la taksadoj de la ministrejo pri internaj aferoj, 38 000 personoj estas koncernataj, plimulte Eritreanoj kaj Sudananoj. La enmigrintoj, kiuj konsentos pri foriro ricevos aviadilbileton kaj preskaŭ 3 000 eŭrojn.

**Maltrankviliĝo de la Unuiĝintaj Nacioj**

En komunikaĵo, la Alta-komisaro de UN por la rifuĝintoj (HCR) esprimis sian maltrankviliĝon memorigante interalie, ke Israelo havas «leĝajn devigojn pri la protektado de la rifuĝintoj». Tamen, de 2009, kiam la israelaj aŭtoritatoj prenis la respondecon determini, kiu apartenas al tiu kategorio, nur ok Eritreanoj kaj du Sudananoj akiris tiun statuson, daŭrigis la HCR. Du cent sudanaj landanoj origine de Darfuro akiris siaflanke «humanitaran statuson en Israelo».

**Interkonsentoj kun fremdaj landoj**

Kadre de sia programo de elpelado, la Israela registaro agnoskas fakte, ke la anoj de tiuj ambaŭ landoj ne povas reiri hejmen. La eritrea reĝimo estis akuzata de UN pri «ĝeneraligitaj kaj sistemaj» krimoj kontraŭ la homaro. Koncerne Sudanon, ties prezidento Omar EL-BEŜIR estas akuzata de la Internacia Punkortumo (CPI) pri militkrimoj, krimoj kontraŭ la homaro kaj genocido.

Laŭ la israelaj NROj, kiuj subtenas la migrantojn, Israelo tiel subskribis interkonsentojn kun fremdaj landoj, kiel Ruando kaj Ugando, kiuj devas akcepti la migrantajn volontulojn.

Neniam Milito Inter Ni

# KDPR konsentis okazigi altnivelan intertraktadon kun Sud-Koreio

La Sud-korea Ministerio pri Reunuigo vendrede [05 jan 2018] konfirmis, ke la Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR) konsentis okazigi altnivelan intertraktadon kun Sud-Koreio la 9-an de januaro en la "paca hejmo" sur la sud-korea flanko en *Panmunjom*.

Proparolanto de la Ministerio pri Reunuigo diris en regula gazetara konferenco, ke vendrede matene je la 10a horo kaj 16 minutoj, la Sud-korea flanko ricevis dokumenton el la KDPR, kiu konsentis akcepti la proponon.



La dokumento diris, ke en la intertraktado la du flankoj diskutos pri partopreno de la KDPR en la Vintraj Olimpikoj en Sud-Koreio kaj plibonigo de la duflankaj rilatoj. Antaŭ tio, ili konsiliĝos pri la konsisto de delegacioj kaj ĉefreprezentantoj por la intertraktado per interŝanĝo de dokumentoj.

La Sud-korea registaro marde [02 jan 2017] proponis okazigi altnivelan intertraktadon kun la KDPR en *Panmunjom* la 9-an de januaro por diskuti pri partopreno de la KDPR en la Vintraj Olimpikoj kaj plibonigo de la duflankaj rilatoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Usono kaj Sud-Koreio ne okazigos militekzercon dum Vintraj Olimpikoj en *Pyeongchang*

Sud-korea Prezidento Moon Jae-in [문재인 / 文在寅 [mun.dʑɛ̝.in]] kaj Usona Prezidento Donald Trump konsentis vendrede [05 jan 2018] en telefona konversacio, ke la du landoj ne okazigos militekzercon dum la Vintraj Olimpikoj en *Pyeongchang* [[pʰjʌŋtɕʰaŋ] aŭ *Pyeongchang-gun* 평창군 / 平昌郡 [pʰjʌŋtɕʰaŋgun]] de Sud-Koreio.



Ĉefsekretario de la Sud-korea prezidentejo Yoon Young-chan diris, ke la du ŝtatestroj konversaciis 30 mimutojn pri dialogo inter Sud-Koreio kaj la Korea Demokratia Popola Respubliko antaŭ la Vintraj Olimpikoj kaj pri aferoj de komunaj interesoj. La du flankoj konsentis plenforte agi por la sekureco kaj sukceso de la Vintraj Olimpikoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Bombatako mortigis almenaŭ 11 homojn en afgana ĉefurbo Kabulo

Almenaŭ 11 homoj estis mortigitaj kaj 20 aliaj vunditaj en suicida bombatako ĵaŭde [04 jan 2018] nokte en la kvartalo *Microryan* de la afgania ĉefurbo Kabulo.



Persono el sekureca departemento diris al la novaĵ-agentejo *Xinhua* [ 新华社 xīnhuáshè], ke la bombatako okazis en *Microryan*, Polica Distrikto 9, je la 8-a horo kaj 45 minutoj posttagmeze laŭ la loka tempo. La eksplodo okazis baldaŭ post manifestacio en la regiono kaj inter la viktimoj estis kontraŭtumultaj policanoj kaj civiluloj.

Antaŭe, oficialulo pri publika sano diris al lokaj amaskomunikiloj, ke 11 homoj, inkluzive de 5 policanoj, estis mortigitaj kaj 20 aliaj vunditaj post la eksplodo. Li diris, ke la nombro de viktimoj probable kreskos, ĉar iuj vunditoj estis en kriza stato.

Ankaŭ pluraj butikoj kaj veturiloj estis difektitaj post la eksplodo en la regiono, kie estas dekoj da kvin-etaĝaj loĝejoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Sudana armeo refoje longigis militpaŭzon je tri monatoj

Sudana prezidento Omar AL-BASHIR subskribis dekreton, deklarante, ke la registara armeo refoje unuflanke longigos la militpaŭzon je tri monatoj en ĉiuj konfliktaj regionoj.



Raporto diris, ke la refoja longigo de la militpaŭzo celas krei pacan atmosferon por la intertraktadoj en la ŝtatoj Sud-Kordofano kaj Blua Nilo, realigi pacon kaj stabilecon en la tuta lando kiel eble plej baldaŭ kaj turni la atenton al solvado de demandoj pri disvolvado.


La Sudana registara armeo komencis batali kun la ribela grupo Sudana Popola Liberiga Movado (Norda Sektoro) en 2011. En januaro de 2014, BASHIR komencis la procezon de nacia dialogo por radikale solvi la longe daŭran armitan konflikton kaj realigi pacon.

En januaro de 2017 la sudana registaro deklaris unuflankan militpaŭzon por ses monatoj. La 2-an de julio [2107] BASHIR deklaris ke li longigas la militpaŭzon ĝis oktobro en ĉiuj konfliktaj regionoj. Poste en oktobro li refoje deklaris ke longigas la militpaŭzon ĝis decembro.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Ni ĵus havas la unuan senperan pruvon ke supermasivaj nigraj truoj regas stelo-formadon

La sciencistoj pri nigraj truoj estis okupataj. Je la fino de lasta jaro, esploristoj anoncis ke la potencaj ventoj emanigataj el supermasivaj nigraj truoj formas tutajn galaksiojn.



Nun, nova esplora raporto trovis la unuan observeblan pruvon ke supermasivaj nigraj truoj fakte regas la misteran procedon de stelo-formado en iliaj galaksioj.

Je la centro de ĉiu galaksio ekzistas supermasiva nigra truo millionojn da fojoj pli masiva ol la Suno, sed ni vere ne multe scias pri ili. Ni ankaŭ ne komprenas kial junaj galaksioj estas plenigataj kun rapide formataj steloj, kaj kio fine kaŭzas tiun ĉi procedon estingi kiam la galaksio evoluas.

Sciencistoj suspektis por jardekoj ke la elverŝanta energio el supermasivaj nigraj truoj iel "estingas" tiun procedon, sed nun esploristoj el Universitato de Kalifornio, *Santa Cruz*, trovis la unuan senperan pruvon ke tio fakte okazas.

La teamo ankaŭ montris ke la maso de la koncerna nigra truo determinas kiom baldaŭ stelo-formado en la galaksio malŝaltiĝas. Alivorte, supermasivaj nigraj truoj ne nur formas la galaksiojn, ili regas kiom da steloj ili havu.

Jean BRODIE, profesoro de astronomio kaj astrofiziko ĉe UC *Santa Cruz* kaj kunaŭtoro de la raporto diris: "Tio estas la unua observebla pruvo kie ni povas vidi la influon de la nigra truo sur la stelo-formada historio de la galaksio."

La teamo solvis tion studante galaksiojn kie la masoj de la centraj nigraj truoj jam estis mezurigitaj en antaŭaj studoj, surbaze de la aktiveco de la objektoj ĉirkaŭ ili en kosmo.

La teamo poste analizis la spektrojn de tiuj galaksioj – kiom da lumo elvenas de ili – por determini ilian stelan historion, ĉu ili ankoraŭ estis aktivaj, kaj kiel longe ili estis kvietaj.

Kiam ili komparis kiam la galaksioj ĉesis formi stelojn per la maso de siaj nigraj truoj, ili trovis frapantajn diferencojn.

Tiuj diferencoj ne povus esti eksplikataj per ajnaj aliaj ecoj de la galaksio – grandeco, formo, aŭ interna kinematiko.

MARTÍN-NAVARRO diris: "Por galaksioj kun la sama maso de steloj sed malsama nigra truo-maso en la centro, tiuj galaksioj kun pli grandaj nigraj truoj pli frue kaj rapide estingiĝis ol tiuj kun pli malgrandaj nigraj truoj."

"Tiel stelo-formado daŭris pli longe en la galaksioj kun pli malgrandaj centraj nigraj truoj."

Tio signifas ke la maso de nigra truo senpere influas je tio kiel rapide stelo-formado ĉesas

okazi en la galaksio. Sed ankoraŭ restas laboro farenda. La mekanismo kiu ligas la mason de la nigra truo al galaksia kvieteco ankoraŭ estas nekonata.

Unu ideo estas ke tio rilatas al la 'aktiva galaksia nukleo' kiu povas formi ĉirkaŭ nigra truo. Aktivaj galaksiaj nukleoj estas diskoj de rubaĵoj ĉirkaŭ nigra truo kiuj disradias nekredeblajn kvantojn de energio kiam la nigra truo konsumas materion. La plej potenca de ili estas kvazaroj.

La raporto eldonita en Decembro [2017] malkaŝis ke, kohere kun modeloj de galaksia evoluo, kvazaraj ventoj – retrokuplo el la aktiva galaksia nukleo – enblovas kaj formas la molekulan gason el kiu steloj estas formataj.

Oni pensas ke fine tiu vento "malŝaltas" aŭ estingas stelo-formadon forpelante la gason.

Sed tio estas nur unu hipotezo.

Aaron ROMANOWSKY, kunaŭtoro de la nova studo diris: "Estas diversaj manieroj ke nigra truo povus meti energion en la galaksion, kaj teoriistoj havas ĉiujn specojn de ideoj pri kiel estingado okazas, sed pli da laboro estas farenda por konformi tiujn novajn observadojn en la modeloj."

La esploro de la teamo estis eldonita en Nature.

Fonto (Angla): sciencealert.com

scienco.ir

---

## Dentisto estis kondamnita pagi milionon kompense al sia patrino

Marde, la 2-an de januaro, Suverena Kortumo de Tajvano ordonis, ke iu viro – idendigita per la familinomo "CHU" – pagu al sia patrino preskaŭ unu milionon da usonaj dolaroj kompense pro tio, ke ŝi prizorgis lian vivtenon kaj diplomigis lin kiel dentiston.



La filo argumentis, ke tute malpravas postuli kompenson pro vivtenado de filoj, sed la tribunalo konsideris la ekziston de valida kontrakto, kiu rajtigas tiun avantaĝon al la patrino.

En la jaro 1997-a la filo estis 20-jaraĝa, kaj tiam li subskribis kune kun sia plejaĝa frato kaj sia patrino kontrakton, kiu determinas – post la koncernaj universitataj diplomiĝoj – pagadojn da 60% de la enspezoj de la filoj al la patrino, kun limo je po 1,7 milionoj da usonaj dolaroj, kiel repago de la universitataj monatpagoj.

Laŭ la loka gazetaro, la plej aĝa filo interkonsentis kun sia patrino je pli malalta sumo kaj plenumis la kontrakton. Post multjara rifuzado de la plej juna filo je la pagoj, ŝi postulis per juĝafero sian rajton, kaj ŝi sukcesis.

La patrino identigita nur per la familinomo "LUO" sole prizorgis siajn du filojn post la eksgeedziĝo. Ŝi timas resti sen inda prizorgado en sia maljuneco.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Pupoj por bona celo

Volontuloj en Ĉeĥujo kudras pupojn por la porinfana helpinstitucio Unicef. El la profito de la vendado estas financataj vakcinaĵoj.



La projekto "Adoptu pupon kaj savu infanon!" ekzistas en Ĉeĥujo de la jaro 2002. Estas la celo kolekti monon por la mondskala kampanjo de la porinfana helpinstitucio Unicef. La estrino de Unicef en Ĉeĥio priskribas la simplan ideon sur kiu baziĝas la projekto.

"Infanoj, volontuloj sed ankaŭ konataj artistoj kaj dezajnistoj kreas pupojn. Ni vendas tiujn pupojn tiam je la prezo de vakcinaĵo por infano. Unu pupo do praktike korespondas al la helpo por unu infano."

La pupo kostas apenaŭ 25 eŭrojn. Tiu sumo korespondas precize al la prezo de vakcino de infano kontraŭ ses mortigaj infanaj malsanoj. Per la kampanjo estas savataj ĉiujare ĝis tri milionoj da infanoj. La estrino de Unicef elstarigas ankoraŭ pluan aspekton:

"Ĉar en la projekto partoprenas infanoj en bazaj lernejoj, ĝi kontribuas al informado pri la problemaro. Dum la infanoj produktas siajn pupojn, la instruistoj parolas kun ili pri la rajtoj kaj la situacio de infanoj en aliaj mondopartoj. La infanoj estas tiel edukataj al solidareco kaj humaneco."

Laŭ la estrino, la projekto dum la pasintaj 15 jaroj ankaŭ travivis malfortajn fazojn. Oni eĉ pensis fini ĝin, sed tio tamen ne okazis.

"Se infano faras pupon kaj tiam ricevas la respondon ke ĝi estis adoptita kaj savita tiel unu vivo, tiam tio havas grandan valoron."

Nome ĉiu pupo havas produktidentigan dokumenton. Sur ĝi staras la nomo de la pupo, sed ankaŭ la nomo kaj la adreso de la produktinto:

"Tiu homo kiu adoptas la pupon informu la produktinton pri la fakto ke la pupo trovis novan hejmon. Ambaŭ partoprenantoj tiel savis vivon."


La ĉeĥa projekto estis prezentita dum la pasintaj monatoj sur du kontinentoj. En aŭtuno okazis sukcesa vendocela ekspozicio en Ganao kaj iom antaŭ Kristnasko same okazis en Novjorko. Tie interalie estis montrataj kaj aŭkcie venditaj la pupoj de konataj ĉeĥaj dezajnistoj, sed ankaŭ de muzikistoj kaj aktoroj. Oni kolektis ĉe tio preskaŭ 3 000 dolarojn. La sumo alte superis la esperojn de la organizintoj.

"En la mondo ĉiujare ankoraŭ mortas unu kaj duona milionoj da infanoj pro malsanoj kontraŭ kiuj eblas protekti sin per vakcino. Mi pensas ke tio estas tragedio en epoko de ĉiaj teknologiaj novigoj kiuj estas ankaŭ haveblaj en evolulandoj. Pro tio ni bezonas ankoraŭ pli da pupoj."

Jarka MALÁ
Esperanta Retradio

# La du plej famaj bengalaj poetoj

Unu estas fama ankaŭ en Okcidento, ĉar li tradukis mem siajn poemojn al la angla, kaj tial ricevis en 1913 Nobelpremion pri literaturo (sed la etoso ankoraŭ estis rasisma en Eŭropo tiam, kaj aperis en iu gazeto ŝerca desegnaĵo montranta vicon da nigruloj, ĉinoj, ktp, nu ĉiuj la «malsuperaj rasoj» tio estas, ĉiuj ne-okcidentanoj! - atendantaj por ricevi sian Nobelpremion, tio estas, ke la desegnisto kaj intencitaj legontoj de tiu gazeto konsideris doni premion pri literaturo al neeŭropano kiel ridindan ideon!



Tiu famulo estas Rabindranath TAGORE (fakte Rabindranath THAKUR). Jen lia eble plej fama poemo en la okcidenta publiko, kiun oni povis plurfoje aŭdi legata ĉe la franca radio, eble ties fameco ŝuldiĝas al tio, ke ĝi estas ne nur bela sed parolas pri infanoj! Kaj ke ĝi ŝajnas facila por kompreni kaj ne religia, male al aliaj poemoj de TAGORE; sed fakte ankaŭ ĝi ja havas religian sencon!

***Poema Oferdono - poemo n-ro 60***

*Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj*
*infanoj sin kunas.*
*Super ili senlima senmovas blua cîel',*
*apud ili la senhaltaj ondoj bruadas.*
*Sur marbordoj de la mondoj senfinaj*
*infanoj kunas sin kun dancoj kaj krioj.*
*Siajn domojn ili konstruas el sablo, ludas per konkoj malplenaj.*
*Per folioj velkintaj ili garnas siajn ŝipojn kaj kun rideto lanĉas ilin sur la maron senfundan.*
*La infanoj plenumas siajn ludojn sur la plaĝoj de la mondoj.*

*Ili ne scipovas naĝi, ili ne scipovas fiŝkapti.*
*La perlokolektistoj ekprofundiĝas, la negocistoj ekvelas ; la infanoj dume kunigas rulŝtonojn, kaj poste ilin disigas.*
*Ili ne serĉas kaŝitajn trezorojn, ili ne scipovas fiŝkapti.*

*La fluso venas kun rido kaj la plaĝo, pala helo, ridetas.*
*La ondoj mortoplenaj kantas al la infanoj necertajn baladojn, kiel patrino al la bebo.*
*La fluso ludas kun la infanoj kaj la plaĝo, pala helo, ridetas.*

*Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj infanoj sin kunas.*
*La ŝtormoj vagas tra la ĉiel' sen vojoj, la ŝipoj pereas en la maro sen trako, morto gvatas kaj l'infanoj ludas.*
*Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj okazas la granda kuniĝo de la infanoj.*

La dua estas eble eĉ pli fama, krom en Okcidento, kie li estas preskaŭ nekonata. Sed li estas deklarita oficiale la Nacia Poeto de Bangladeŝo. Temas pri Kazi NAZRUL Islam.

Dum TAGORE estis hindua kaj el riĉa familio, Kazi NAZRUL Islam estis islamano kaj el malriĉa familio. Dum

TAGORE restis sore super la politikaj temoj, poeziante el religia inspiro, NAZRUL partoprenis la politikan lukton kontraŭ la koloniantaj britoj, kaj estis dum tempo en karcero. Kvankam islama, li edziĝis kun hinduino, kaj en siaj poemoj uzis ne nur islamajn temojn sed ankaŭ hinduajn. Jen lia poemo.



***Ŝtelistoj kaj rabistoj***

*Kiu ŝtelist' nomas vin?*
*amik', kiu rabist'?*
*Ĉie ŝtelistoj marŝas, kaj regas rabistoj*
*Ĉu ia Daniel' juĝos al ŝtelistoj*
*Ĉu iu ajn sur ter' ne estas ekpluatist'?*

*Plejalta juĝ' tenu sceptron ! ĉar granduloj*
*Nur pro ŝtelinte malfortulojn grandas.*
*Ju pli vastas la ŝtel', ekpluato friponas,*
*Des pli altas status' de l'modernaj regnoj.*

*Kreskas palacoj el seka sang' de subpremataj gentoj,*
*Profitojn altigas kapitalistoj detruante hejmojn,*
*Kia fiinfera maŝin' estas ĝi nutrita per homa karn'?*
*Vivaj geviroj enen, eleniĝas rekrementa sukerkan'*

*Uzinoj elpremas el miloj da homoj la homecon,*
*Por al milionuloj plenigi vinglasojn kaj orkestojn*
*Uzuriston dikventrigas manĝ' bezona je l'malsataj*
*Posedanto ruinigas hejmojn por akiri la kaleŝon.*

*Negoca pens', faris de l'mond' prostituejon*
*Malico kaj Malbono servilaj sklavoj*
*Pokaltenante kantas al ĝi kanton de avido*

*Homo perdis manĝon sanon vivon kaj esperon*
*Kaj parolrajton, bankrotita kuras li*
*Al nepra detruiĝ'. Ne videblas eskapvojo,*
*Ĉar tutĉirkaŭ 'stas fosaĵoj instalitaj de monavid'.*

*La tuta mond' 'stas karcero,*
*ŝtelistoj ties provosoj.*
*Ŝtelistoj al ŝtelist' svatiĝas,*
*Friponoj inter fi fratiĝas.*

*Kiu ŝtelist' nomas vin? amik', diras, ke vi ŝtelis?*
*Nur kelkajn monerojn, rizbovlojn vi prenis,*
*Sed ne ponardon vi ŝovis en homkoron.*
*Ne malhoma estas vi kvankam ŝtelist'.*
*Kiel Ratnakaro vi povas iĝi Valmik'**,*
*Se nur renkonti veran homon.*

(esperantigis el la angla traduko R. PLATTEAU)

* Valmiki, la aŭtoro de fama epopeo Ramajano , nomiĝis fakte Ratnakaro kaj estis rabisto, legendo rakontas pri lia renkonto kun saĝo Narado post kio li mem fariĝis saĝo.

R. PLATTEAU
Turka stelo, n-ro 25

# Ĉina fakultato instruas Esperanton al ĉiuj lernantoj


Ĉiuj lernantoj de la Aviad-Turisma Fakultato de la Artkolegio de *Kunming*, en la suda regiono de Ĉinujo, estas lernantaj Esperanton. Laŭ la raporto publikigita de la revuo *El Popola Ĉinio*, la instruado de la Internacia Lingvo estas deviga kaj komenciĝis en la dua duono de la pasinta jaro.




Pluraj studentoj ne konis tiun idiomon. Tamen ili tuj montris entuziasmon eklerni ĝin. Ili eĉ estigis Esperanto-klubon, oficiale fonditan je la lasta 15-a de Decembro.

Kiel rezulto de tiu iniciato, la estraro de tiu fakultato kreis Esperanto-angulon en tiu kampuso [universitatejo]. Tie la lernantoj povas libere praktiki la lingvon en liberaj momentoj.

Esperanto Ilustrita



## Ĝibran Ĥalil Ĝibran

**Ĝibran Ĥalil Ĝibran (arab.: جبران خليل جبران ) (* 6-a de januaro 1883 en Libano – † .10-a de aprilo 1931 en Nov-Jorko) - libana poeto kaj artisto.**

**En Esperanto aperis: *Rakontoj kaj Poemoj*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Stacio sur *Cime de Caron*, Francio.**

**Vikipedio**